DE L'ANNULATION DES DETTES

Un exemple de l'antique Babylone

PRI LA NULIGO DE LA ŜULDOJ

Iu ekzemplo el la antikva Babilono

Thomas Genty

Lyon-Valuisant, la dudekdua de oktobro 2013






Assiraj benantaj Genioj, Nimrud, Irako, oka jarcento antaŭ nia erao

Ni ĉiuj konas la nunan situacion, en kiu sin enprofundigas niaj nuntempaj socioj. Mi do ne parolu plue pri tio, pli precize pri la multnombraj ŝuldaj aferoj : tiuj de la ŝtatoj, de la bankoj, aŭ de la simplaj, plejmultnombraj, geuloj. Laŭ mia opinio, oni jam legis multajn, eĉ eble tro da, skribaĵojn. Ĉie : gazete, televide, reteje, k.t.p., temas pri la ŝtataj, bankaj, komercadaj (unuvorte kapitalistaj), kaj individuaj ŝuldoj, kiuj iĝas unu el la plej gravaj problemoj de niaj okcidentaj socioj.

La novaĵon, kion mi tie proponas estas…tre maljuna ! Ĝi venas de la plej malnova antikva tempo : de la mezopotamia, aŭ assiro-babilona, civilizacio.

Tie, en la nuna Irako, la Ŝumeroj inventis la skribon (ĉirkaŭ 3400 antaŭ nia erao) ; Babilono estis fondita (ĉirkaŭ la deknaŭa jarcento antaŭ nia erao) kaj iĝis unu el la plej grandaj imperioj de la antikvaj tempoj (dekoka jarcento kaj, pli poste, dum la unua jarmilo

antaŭ nia erao), kiu estris la tutan Mezan-Orienton. Estis la epoko de la invento de la matematika astronomio ; la sciuloj disponis grandan aron da tekstoj, skribitaj sur terargilaj tabeloj : pri astronomio, beletro, astrologio, medicino, k.t.p.



Karto de la antikva Meza-Oriento dum la unua duono de la unua jarmilo antaŭ nia erao.

El tiu civilizacio oni renkontas, en iuj tekstoj, menciojn pri la *Andurâru*-edikto kaj la *Mîŝaru*.

La *Andurâru*[1] estas dekreto de reĝa justeco, kies la *Mîŝaru* estas unu aspekto, tiu kiu interesas nin : **la *Mîŝaru* estas la leĝa dekreto kiu pure nuligas la ŝuldojn, por rimedi disfunkciojn ekonomikajn**.

La plej malnovajn menciojn kiujn oni konas, estas ŝumeraj (2100-2000 antaŭ nia erao, aŭ eĉ antaŭe)[2]. Ŝumerlingve, por pridiri tiun dekreton, oni diris « ama-ar-gi », « reiro al la patrino ».

Oni havas pli multe da informoj devenante de la malnovbabilona epoko (ĉefe dekoka jarcento antaŭ nia erao), per pluraj tekstoj[3], reĝaj ediktoj (interalie tiu de la reĝo

[1] Dominique CHARPIN, « Andurâru », *in Joannès, Francis (dir.), Dictionnaire de la civilisation mésopotamienne*, Paris, Robert Laffont, 2001, pp. 48‑49; Dominique CHARPIN, « Les édits de « restauration » des rois babyloniens et leur application », *in Nicolet Claude (éd.), Du pouvoir dans l'Antiquité: mots et réalité*, Genève, Droz, 1990, pp. 13‑24; A. Leo OPPENHEIM, Erica REINER et Robert D. BIGGS (eds.), *CAD A part II – The Assyrian Dictionary of the Oriental Institute of the University of Chicago*, Chicago, The Oriental Institute, Chicago, Illinois, U.S.A. and J. J. Augustin Verlagsbuchhandlung, artiklo *Andurāru*, p. 116-117; A. Leo OPPENHEIM, Erica REINER et Robert D. BIGGS (eds.), *CAD M part II – The Assyrian Dictionary of the Oriental Institute of the University of Chicago*, Chicago, The Oriental Institute, Chicago, Illinois, U.S.A. and J. J. Augustin Verlagsbuchhandlung, 1977, artiklo *Mīšaru*, p. 116-119.
[2] Adam FALKESTEIN, *Die neusumerischen Gerichtsurkunden*, München, Verlag der Bayerischen Akademie der Wissenschaften, 1956, 93, n. 2.

Ammişaduga), leteroj, juraj tekstoj, kontraktoj, k.t.p. Oni renkontas menciojn pri *Andurâru* kaj *Mîŝaru* dum la tuta dua jarmilo antaŭ nia erao, kaj fine dum la epoko de la grandaj imperioj, assira kaj babilona, de la unua jarmilo antaŭ nia erao.

Kio do okazis, dum dekreto de *Andurâru-Mîŝaru* ? La reĝo, okaze de la apliko de la reĝa justeco, proklamas edikton-*Mîŝaru*-on en lia lando : (babillingve) : « *aŝŝum ŝarrum mīŝaram ana mātim iŝkunu*[4] » : « pri la *Mîŝaru* kiun la reĝo disponigis al la lando ». Estis unu el la tradiciaj – sed esceptaj – reĝaj aplikoj : tiom escepta ke, kelkfoje, iĝis jarnomo (jaroj havis nur reĝajn ciferojn, ekz. « la jaro tria de la reĝo x », aŭ nomojn de gravaj okazaĵoj). Ekzemple : « *ŝattu mîŝaram Abimadar*[5] », « jaro de la *Mîŝaru* decidita de Abimadar ».



Asira reĝo de la oka jarcento antaŭ nia erao, laŭ murpentraĵo en la asira palaco de Til-Barsip (nuna Tell-Ahmar, norda Sirio)

Tiu edikto okazigis aron de decidaĵoj favore al la plej malfortaj geuloj de la socio. Interalie : nuligo de la ŝuldoj kiuj ne tuŝis la internacian komercadon.

Konkrete : iu ŝulda sklavo (t. e. persono kiu sklaviĝis, aŭ sin sklavigis, por pagi sian ŝuldon al mastro lia) retrovas lian liberecon, liaj ŝuldoj estante nuligitaj per la *Mîšaru*-edikto. Tamen, iu sklav-naskitulo ne liberiĝis, sed reiris al lia antaŭa mastro : estas la ŝuldoj de la mastro kiuj estis nuligitaj, interalie koncernantaj la sklavo mem. Ĉefe : la *Mîŝaru*-edikto okazigis la reiron de la posedaĵoj. Ekzemple : iu bieno vendita por sin senŝuldigi reiris al ĝia antaŭa bienhavanto. Samume, la geulaj ŝuldoj estis pure kaj simple nuligitaj.

Ekzemple, diris iu reĝo[6] : « *addurār kaspim hurāşim werîm annikim še'im šipātim adi…pa'ē aškun* », « Mi proklamis *Andurâru*-edikton por ŝuldoj je arĝento, oro, kupro, stano, greno (hordeo/tritiko), lano ». Ne estis mono dum tiuj tempoj. Ekonomio, ambaŭ loka kaj

---

[3] Fritz Rudolf KRAUS, *Ein Edikt des Königs Ammi-Şaduqa von Babylon*, Leiden, Brill, coll. « Studia et documenta ad iura orientis antiqui pertinentia », n? 5, 1958; Fritz Rudolf KRAUS, « Ein Edikt des Königs Samsu-iluna von Babylon », *in Güterbock, Hans G. et Jacobsen, Thorkild (éd.), Studies in honor of Benno Landsberger on his seventy-fifth birthday*, Chicago, The University of Chicago Press, coll. « Assyriological Studies 16 », 1965, pp. 230‑231; Dominique CHARPIN, « L'Andurârum à Mari », *Mari, Annales de Recherches Interdisciplinaires*, vol. 6, 1990, pp. 253‑270.

[4] Fritz Rudolf KRAUS, *Ein Edikt des Königs Ammi-Şaduqa von Babylon*, *op. cit.*

[5] JCS 9, 66, n.32, r. 3.

[6] Altorientalische Bibliothek I, Leipzig, 1926, 12, n. 7 : 27 (Irišum).

grandskala, internacia, estis bazita sur ekvivalentoj inter pezoj de pluraj riĉaĵoj, ĉefe greno kaj metaloj.

Same, okazigis la *Mîŝaru*-edikto plurajn dokumentaĵojn. Ekzemple, en multnombraj kontraktoj, oni precizigis : « tabelo skribita ĉe la Granda urba Pordo [(tie, kie oni tradicie kontraktis)], post la proklamo de la *Andurâru*-edikto » (« *ţuppu ina arki andurāri ina bāb abulli šaţir* »[7]). Aliekzemple : oni detruis la dokumentojn pri la nuligitaj geulaj ŝuldoj : « Ili frakasis la privendajn dokumentojn kiuj iĝis nevalidaj pro la *Andurâru*-edikto » (« *ţuppāt šīmātim…ša ina mīšari waşia uheppû* »[8]). La posedaĵoj (bieno, oro, arĝento, aliaj metaloj, lano, greno, k.t.p.) tuŝitaj je la ŝuldoj do reiras al la antaŭaj gehavantoj, se tiuj povas videbligi la dokumentojn provintajn ke tiuj posedaĵoj estis lasitaj por ilin senŝuldigi antaŭ la proklamo de la *Andurâru*/*Mîŝaru*-edikto.

Sed atentu ! Tiu *Mîŝaru*-edikto tuŝas nur geulajn ŝuldojn, kaj ne la internaciajn komercadajn. Oni ne forgesu ke la antikvaj socioj de Mezopotamio (ne nur ! : preskaŭ ĉiuj antikvaj socioj) ĉeestas sub reĝaj reĝimoj universale akceptitaj, sub ege kapitalista ekomomia sistemo jam tre kompleksa, kaj sub ĝenerala konservegema spiritostato. Tiuj ediktoj povis ekzisti nur ĉar iĝi estis tradicia reĝa prerogativo. La vorto mem « *Andurâru* » signifas, etimologie, « reiro al antaŭa situacio ». Neniel temas pri progresema decido.

Same, tiu senŝuldigo ja estas leĝa agado rimedanta disfunkciojn ekonomiajn, ebliganta la socion spiri denove ; tiuj ediktoj estis ege popolaj ĉe la gemalfortuloj ; tiuj decidoj permesis redistribuon sanigan. Sed ja ne temas pri reformo. La strukturo de la socio neniam estis tuŝita.

Iu *Mîŝaru*-edikto, en niaj nuntempaj socioj, sonĝigas nin…Ĉiuj ni ŝatus vidi siajn ŝuldojn (ĉu por pagi domon, ĉu por veturilon, k.t.p.) subite nuligitajn ! Plie, se tia apliko estus tia tradicia kia estis en Mezopotamio, estus ankoraŭ pli bona !

Kion oni do konkludu ? Ke tio, la nuligo de la ŝuldoj, eblas. La kapitalista ekonomio de tiu fora periodo jam estis kompleksa, internacia, kaj necesis akciulojn. Surprize en tia frua epoko, estis aristokrata-burĝa ekonomio preskaŭ moderna. Jen, fakte, la *Mîŝaru*-ediktoj neniam detruis tiujn sociojn. Male, ĝi iĝin sanigis ! Niaj nuntempaj bankoj ne pli estus grave tuŝitaj ! Nek pli ol iĝiaj antaŭoj, kies investoj estis multe pli riskitaj, kaj kies profitpartoj de pruntoj estis multe pli altaj (20-30%, eĉ pli, kelkfoje !). Dum tiu frua epoko, estis pli da perdeblaĵoj ol por la nuntempaj bankoj, sendube ! Ĉiukaze, malgraŭ la *Mîŝaru*, nenio sin disfalis. Jen, tio nin lasas pripensemaj…

Tamen, oni notu ke tia rimedo, *Mîŝaru*-tipa, estas malprofundema. Oni tion diris antaŭe : ne temis pri struktura reformo ; kaj la ŝuldoj plu sin akumuligis tuj post la *Mîŝaru*-dekreto, tiel ĝis la veninta *Mîŝaru*, k.t.p. Tio dankas historian lecionon : la nuligo de la ŝuldoj ja estas dezirinda rimedo kaj verŝajne ne estus katastrofo por niaj socioj. Sed klare ne sufiĉas longdaŭre. Nur struktura (ambaŭ polotika kaj ekonomia) reformo estas daŭra rimedo.

[7] Harvard Semitic Studies 5, 25 : 24.

[8] Fritz Rudolf KRAUS, « Ein Edikt des Königs Samsu-iluna von Babylon », *op. cit.*, 234 : 9.